# LA UNIVERSALA TAGO DE ESPERANTO EN CALLOSA DE SEGURA



**I.L.E.I. Estraranoj kaj Delegitaro pozas dum la Honora Vino.**
**Semajno de la Homaj Rajtoj kaj Esperanto en Callosa de Segura, 17 dec. 78**

Okaze de la celebro de la Tago de Homaj Rajtoj kaj la Universala Tago de Esperanto, koincidantaj ambaŭ datoj en la sama semajno, okazis en tiu ĉi urbo agado de esperanta firmigo organizitaj de la loka grupo. La ago okazis en la Nacia Kolegio «Primo de Rivera» je la 11-a horo de la 17-a de decembro, dimanĉo matene, ĉeestante preskaŭ la tutan membraron de la Grupo kaj multajn reprezentantojn el Alicante, Elche, Novelda, Albatera kaj Alquerías (Murcia), multajn simpatiantojn kaj la membrojn de la urba blovmuziko, kiu aliĝis al tiu okazintaĵo. Ni devas elstari la ĉeesto de nederlandaj geedzoj, kiuj profitante la okazon parolis en la internacia lingvo kun la ĉeestantaj samideanoj.

Malfermis la agon la Direktorino de la Nacia Kolegio, Sinjorino Carmen Baeza Gil, kiu montris lian kontenton pro tiu kunveno, kiu impresis ŝin pro la entuziasmo kiun montras la esperantistoj en siaj laboroj por disvastigi Esperanton.

Ŝi ofertiĝis senkondiĉe por ĉio kio servos al la disvastigo de la Zamenhofa Lingvo.

Sekve, la salesiana Pastro Josefo Mikaelo Armelles, profesoro de la Profesiaj Lernejoj el Elche, prononcis vortojn en esperanta lingvo, gratulante sin de la ago kaj esprimante siajn dezirojn por ke tiu ĉi idiomo havu en la mondo elstaran lokon.

La reprezentanto el Alicante, S-ro Mikaelo Manteka, klera esperantisto parolis per samaj vortoj en la universala lingvo. Tiel, same la reprezentanto el Callosa de Segura kaj Sekretario de la Grupo, kiu elstaris la universalajn valorojn de Esperanto.

Fine, parolis la prezidanto de la loka Grupo kaj Nacia Delegito de I.L.E.I. S-ro Francisko Zaragoza Ruiz, senlacebla propagandisto de tiu movado, kiu faris gloson de la homaj rajtoj kaj de la esperanta lingvo, elstarante la universalajn valorojn de tiuj ĉi movadoj, kiuj enhavas fortajn sentojn de amo, paco kaj frateco inter la homoj.

S-ro Zaragoza finis lian paroladon esprimante la dankemon de ĉiuj esperantistoj al la Direktorino de la Kolegio, S-rino Baeza Gil, pro ŝia mult'valora kunlaborado.

Ĉiuj oratoroj estis tre aplaŭdataj. Sekve oni servis honoran vinon, kaj poste la tuta ĉeestantaro eliris al la Promenĝardeno, kie la blovmuziko, direktita de S-ro Vicente Juan Illán, interpretis brilante bonan programon kiu ŝatis multe al la aŭdantaro.

Granda tago por la Esperanta Lingvo kaj paŝo pluen en la peno por ĝia disvastigo en la mondo.

**V. MOLINS REIG**
**Sekretario de I.L.E.I. Hispana Sekcio**

# VALLADOLID



**Membroj de Fido Kaj Espero atente aŭskultas interesan prelegon**

Kiel tradicie, la Grupo «Fido kaj Espero» celebris kun granda entuziasmo la diversajn aranĝojn organizitajn okaze de la 119-a datreveno de la kreinto de Esperanto, kaj XXX-a de la Proklamo de la Deklaracio de Homaj Rajtoj.

La 14-an, en la salono de la Grupsidejo, S-ino Mª Rafaela Urueña, Prezidantino de H.E.F. kaj Profesorino pri Internacia Juro, prelegis esperantlingve pri «Esperanto kaj la Rajto pri Komunikado». Ŝi komencis sian interesan kaj bone dokumentitan prelegon, menciante la kialojn por ke la esperantistaro kune celebras ambaŭ eventojn, dirante ke «vere ekzistas rilato, ĉar Zamenhof estis homo kiu helpis, per sia kreado de Internacia Lingvo, la internacian komprenon, la internacian edukadon, faciligante la voĝajojn inter landoj helpe de komuna neŭtrala lingvo».

Poste, ŝi faris historion pri la diversaj Deklaracioj kiuj enhavas homajn rajtojn, komencante de la «Deklaracio pri Rajtoj» de la jaro 1688 proklamita de la angla Parlamento, kaj kiun devis akcepti la reĝo Vilhelmo la III-a, kaj finante pri la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, studante speciale la 13-an artikolon, kiu tekstas jene: «Ĉiuj havas la rajton libere moviĝi kaj elekti sian loĝlokon interne de la limoj de iu ŝtato, ĉiuj havas la rajton forlasi iun ajn landon, inkluzive la sia kaj reveni al ĝi».

Sekve, kaj analizante tiun rajton, ŝi menciis kiamaniere jam en la XVI-a jarcento la grandaj hispanaj internaciistoj kiel Pastro Francisco de Vitoria antaŭvidis tiun rajton. En la verko «De Indiis», Pastro Vitoria defendis la «ius communicationis» (rajto pri komunikado) kiel Natura Rajto, dirante «la popolo kiu malfaciligas tiun rajton al aliaj malkonas la Naturan Juron». Sed, kiel defendi nuntempe tiun rajton se homo ofte estas neklera kaj ne konas alian lingvon ol la sia propra denaska lingvo?

Ŝi daŭrigis dirante ke tiu ĉi problemo ankoraŭ ne estas oficiale solvita, sed ni, la esperantistoj, havas la solvon, kvankam la homaro ne ĉiam volas aŭskulti nin.

Finante, ŝi diris ke ni neniam povos ĝui la homajn rajtojn se ni ne estas kapablaj interkomunikiĝi pere de komuna neŭtrala lingvo, kaj Esperanto estas la nura, ĝis nun, interkomunika lingvo por la tuta homaro.

La ĉeestantaro, kiu plenigis la salonon, multe aplaŭdis je la fino. Sekve, oni lotumis diversajn esperantajn librojn.

La 15-an, samloke kaj samhore, S-ro Vicente de la Parte, profesoro de la Elementa Kurso, prelegis hispane pri «Zamenhof y la importancia de un idioma internacional». La preleganto komencis farante historion pri sia propra esperantiĝo, kaj parolante speciale al la novaj gelernantoj li diris ke «Esperanto ne estas lingvo kies originoj devenas de la pratempo, sed ĝi estas nova lingvo kreita en la XIX-a jarcento.

Sekve, S-ro de la Parte, faris historion de la vivo de D-ro Zamenhof menciante la obstaklojn kiujn li devis venki por aperigi sian verkon, kaj la ĝojon kiun Zamenhof sentis kiam vidis sian kreaĵon disvastigita tra la tuta mondo.

Li finis sian interesan prelegon, rimarkante la socian celon de Esperanto, kiu faras ke la internaciaj organizaĵoj kiel UNESKO, U.N. k.t.p. interesiĝas pri ĝi, kaj la amikecan celon de la internacia lingvo, reliefigata ĉiujare dum la internaciaj kongresoj kaj kunvenoj.

Tondran aplaŭdadon ricevis S-ro de la Parte. Sekve, la novaj gesamideanoj ricevis, donace, la Esperantan emblemon. La programo finis per hispana vino malavare donacita de la Grupo al siaj membroj kaj simpatiantoj.

La 17-an, dimanĉo, Pastro Jonás Castro, Mesofaris kaj predikis en la internacia Lingvo, je la unua postagmeze, en preĝejo «Jesuo Nazareno».

Poste, grupo de gesamideanoj vizitis S-rojn Cantalapiedra kaj Gamboa, ambaŭ elstaraj membroj de nia Grupo kiuj pro akcidentoj ne povis partopreni la ĉijaran Feston.

Je la dua p.m. grupo da gesamideanoj kaj simpatiantoj kunvenis en restoracio por frata manĝado. La ĉijara programo finiĝis per amika renkontiĝo en la sidejo de Fido kaj Espero, kie oni disdonis la ĉijarajn premiojn aljuĝitaj al niaj samideanoj S-ro Urueña kaj S-ro Hernández. La lokaj radioj kaj ĵurnaloj informis amplekse pri tiuj aktoj.

Dum tiuj ĉi tagoj, Libroservo de H.E.F. prezentis ekspozicion pri novaĵoj.

L. HERNANDEZ

# Sekcio de MONDPACA ESPERANTO MOVADO En Hispanio

Ĵus aperis la informilon de la nova hispana sekcio de M.E.M.titolita «Antón Balagué», sub redaktado de S-ano Luis Serrano Pérez, el Sabadell.

La provizora Komitato konsistas el:

| | | |
|---|---|---|
| Ĉefa prizorganto | F. Oliván Guiu | Zaragoza |
| Sekretario | Faustino Castaño | Gijón |
| Kasisto | S. Torné Grau | Sabadell |
| Informa Fako | J. José Hernández | Madrid |

Ni deziras grandan sukceson al ili en ilia porpaca laboro.

# Nova esperanta Klubo «LA VERDA LEONO»

De ĉiuj ni, estas konata la granda kaj mirinda sukceso de la 38ª Nacia Esperanto Kongreso, ĉe la belega, historia kaj monumenta ĉefurbo León.

En «Sabadell Esperantisto» oni parolas pri «la nura esperantisto Leona» Pastro Patrico de Fuentes k. de Valbuena, kaj pri la brila sukceso de la Kongreso, kiu ne fiaskis, kiel antaŭtimite; sed, male, «ĝi digne sukcesis, malgraŭ la rekorda tempo (nur du monatojn) eluzita por ĝia organizado».

Do nia 38ª Nacia Esperanto Kongreso plenplene sukcesis!!! Kaj sukcesis, unue per dia apogo (dank' al Dio!) kaj helpante la socialkomunikiloj kaj loka gazetaro, sur kiu aperis ĉiutage: resumo de la eroj de l'Kongreso, diversaj artikoloj, fotoj pri ĝi k.t.p.

Kaj ankaŭ ni diversmaniere (ĉu per la gazetoj, ĉu pere de radiodissendoj) «semis kaj semis konstante la semon» (benitan semon!!!) de nia estonta Klubo «LA VERDA LEONO».

La tagojn 5ªn, 9, 15, 19 k. 22-an de la novembra monato, ĉe la leona gazetaro publikigis notoj kaj avertoj pri la tuj komenconta esptº kurso; pri la loko ĵus eltrovita (Str. Torre, 7); pri la tago de la inaŭguro (24-11). La de esperantistoj entuziasmo estas, jes! neforgesebla afero, sed ankaŭ ne (tute ne!) priskribebla: preskaŭ naŭdek (90) gekuriozuloj ensovas sian nazon en la esperantan vazon: sed bedaŭrinde, kiel konate, ne ĉio iris-glate: ĉi tie kiel aliloke (ĉiuloke), el tiel kreskanta kaj unue iluzita nombro, malsupreniris la varbitaj gestudentoj al la numero de la seĝoj aŭ lernegaj lokoj: pli malpli kvardek (40).

Finfine, la 24ªn de novembro (tre malfrue malfeliĉe, pro la prokrasto de la alveno ĉe ni de la tekst-k. lernolibro) okazis la malfermo de la kurso pere de la unua mallonga leciono, prelegante la Pastro de Fuentes k. de Valbuena pri «**Kial la esperanto en la lernejoj?**», proponante la de ni konatajn argumentojn, kiuj ŝajnis konvinki la ĉeestantaron, kiu tondris la lernejon per aplaŭda gesto.

Multajn, multegajn malfacilaĵojn ni trovis ĉe nia malfacila vojo al la esperanta lingvoscio, precipe la ĵus menciitan malfruon de la lernolibro, kiu alvenis ĉe ni je la Kristnasko, kiam oni ekferiis ĝis la 10 de sekvonta monato januaro; tiam, ni rekomencis la preskaŭ ne komencitan kurson.

Tamen ni celebris ĝoje kaj amikeme la **Zamenhofan Tagon** (119 datrevenon de lia naskiĝo) jene: **15-12-78**: En la lernejo kien ni kunvenadis por la esp-aj lecionoj, la saman horon (8-9 posttagmeze) la Pastro de Fuentes k. de Valbuena prelegis pri «**La kultura esperanto fenomeno**», kiu estas preskaŭ ne pli ol la resumo de la notinda kaj ŝatinda verko franca «L'Esperanto», kies aŭtoro estas Pierre Janton. **17-12-78**: dimanĉon, je la 13 h. Sankta Meso en E-o okazis en la preĝejo de la Monahinoj de Stª Klara (Str. Card. Landázurri-El Convento), kiun gvidis la Karmelanaj Pastroj Germán Lezcano Guerra kaj de Fuentes k. de Valbuena, kiu ankaŭ havis la esperantan homilion pri la utilo (plu: pri la neceso) de helpanta, internacia lingvo E-o. Laŭmode de samtempa traduko, la diakono Frato Puente Cruzado legis hispane ĉiujn la paragrafojn, kiujn esperantlingve prononcis la ĉefcelebranto.

Sinsekve, en la trinkejo «Bar Mansilla», la leona nova esperantistaro interkonatiĝis, amikiĝis, trinkadis, manĝetadis, tostis...je la sano de ĉiuj, kaj familian etoson frate ĝuis.

La 10-an de januaro de 1979 rekomencis la esperanta kurso, kaj je la fino de ĉi tiu monato finiĝis la 8 lecionoj de la lernolibro, kies en la monato februaro relegiĝis la tutan enhavon, kaj la saman monaton finis ankaŭ nian unuan elementan E-on leonan kurson feliĉe!

Sed por ke tia fajrero, forpelita el fajrujo (kiu ĉiam nepre kaj nepercepteble estingiĝas) ne malvarmigu, ni sendis kolektivan leteron al ĉiuj esperantistoj (kursanoj unue) kaj simpatianoj, samkiel aliĝilojn por la estonta fundamento de nia VERDA LEONO, KLUBO. Iluzioplenaj nun atendas la rezulton de tiu esperanta dissemo. Dio favoru!!!

Karaj, karegaj, elstaraj gekursanoj: ĉiam antaŭen!!! Kiel de vi konate, je la oka h. vespere ni kunvenos ĉiulunde por praktiki (parolante, babilante senĉese) nian belegan Zamenhofan internacian, helpantan ESPERANTAN LINGVON.

Ankoraŭ unun fojon: dankon elkorajn al vi ĉiuj!!!

Pastro de Fuentes k. de Valbuena

# ESPERANTISTA VIVO

## VETERANA ESPERANTISTA KLUBO

Ni volas kore peti al la hispanaj Esperantaj pioniroj, kiuj ankoraŭ ne faris tion, ke ili aliĝu al V.E.K.

La klubo havas centojn da membroj tra la mondo kaj ankaŭ multajn el nia lando, sed kelkaj ankoraŭ ne aliĝis, kaj pro tio hodiaŭ ni instigas ilin.

Nura Kondiĉo por esti ano de V.E.K. konsistas en ke oni jam lernis la internacian lingvon antaŭ 40 jaroj.

Oni devas indiki la daton de naskiĝo kaj ankaŭ tiun de la koncerna esperantiĝo. Se eble, sendi foton de la nova aliĝinto, kaj estas kore bonvena ankaŭ respondkupono por sendi al la sekretario de VEK en Germanio kaj iom helpi la sendelspezojn.

La klubo publikigas siajn sciigojn kaj listojn en INFORMILO de Internacia Esperanto-MUZEO en WIEN, kiu aperas kvarfoje en la jaro.

La nuna «Dojeno» de VEK estas s-ro Victor Lebrun el Francio, kiu naskiĝis en 1882 kaj esperantiĝis en 1899. Estus interesa afero ankaŭ scii kiu estas la nuna hispana «Dojeno» de Esperanto.

Ni esperas la tujan aliĝon de ĉiuj hispanaj pioniroj. Bv. fari tion pere de la hispana reprezentanto de VEK:

RAMON MOLERA
Sta. Joaquina, de Vedruna 13
MOYA (BARCELONA)

La Kataluna Kultura Centro de Perpignan petis s-ron René Llech-Walter, delegito de U.E.A., prelegi en Kataluna Lingvo pri la problemo de la interkompreniĝo.

Post ludado kaj kantado de la «La Espero» per la gajaj katalunaj Trobadoroj, Llech-Walter, elmontris per okulfrapaj faktoj ke Esperanto estas solvo de la homara interkompreniĝo.

La plej grava rezulto de tiu prelego estas la varbado de la prezidanto de la Kataluna Kultura Centro s-ro Joseph Deloncie, Direktoro de la Muzeo pri popolaj artoj kaj tradicioj de la urbo de Perpignan, 29, Rue de Gascogne, 66000 Perpignan (Francio). Oni povas lin gratuli letere aŭ P.K.

## NOTO

O.R.F. el Vieno skribis leteron al la estraro de H.E.F. dankante la ricevon de Boletín, per la jenaj vortoj:

«Post plurmonata interrompo reaperis BOLETIN, organo de la Hispana Esperanto Federacio. Interesas speciale kaj ankaŭ ekster regione, pluraj artikoloj pri scienco kaj arto, popolare prezentataj.

Ni bonvenigis vian periodaĵon kaj menciis ĝian ricevon en nia rubriko «Leterkesto» kun mallonga indiko pri ĝia enhavo aŭ karaktero. Same ni faros se vi daŭrigos la alsendadon, sed ni ne povas informi vin pri tio ĉi unuopan fojon. Bonvolu do mem kontroli por aŭskultado.

Ankaŭ la datoj, ni ne povas fiksi enantŭe.

Kun tre amikaj salutoj.

Esperanto-Redakcio de O.R.F. VIENO (Austrio)

## ANONCO

S-ro Georgi Sestrimski, ul. Silistra 4, 4.400 PAZARDJIK (Bulgario) deziras korespondi kaj intersanĝi poŝtmarkojn kun esperantistoj filatelistoj el ĉiuj landoj.

## KLARIGO

En nº 228-229 de BOLETIN, aperis informon pri starigo de Interparlamenta Grupo «Amikoj de Esperanto». Tiu Grupo, kiu laŭ informoj ricevitaj el D-ro Antonio de Salvo el Romo (Italio), atingis 75 membrojn, naskiĝis en Italio, lando kies nomo ni forgesis mencii.

# POEZIA ANGULO

## DUBO

Ĉu vi partis tie?
diru min kie vi estas,
venu, revenu denove,
nun al vi mi petas.

Kvazaŭ jam vi pensos
kiom mi suferas,
sed trovante mia animo
kiel glacia ĝi restas.

Ĉu vi revenos poste?
mi jam tion ne kredas,
nure ĉiam mi vivos
rememorante kaj plendas.

ROSARIO ROMERO

## POSTKONGRESA POEMO

Tre utilaj, ege ĝojaj estis
kaj en ĉies la memoron restis
tagoj de l'Kongreso 63ª
en reĝino Nigramara nia!

Zumis parolad' esperantista
en palaco la Sportista
kie regis la etos' kongresa
dum ĉi festo nia riĉimpresa.

Nia nova esperanta mondo
en elita multnacia rondo
sin prezentis per program' varia
dum proceso suprenira sia.

Estis la program' efike brila
jen amuza, jen utila,
oni penis pri l'kontento
kaj sincera danka sento.

Geamikoj karaj mi revidis
kaj nature, novajn eĉ akiris
ĝuis ĉiuj ni kuneston
dum la jara tradicia festo

Malĝentila estus je la manko
en verkaĵo la ŝuldata danko
al fervoraj niaj estraranoj
kaj al lacigitaj Lo-Ko-Kanoj!

Jam eniris l'historion
grandioza sesdektria
estos ĝi inspiro kaj espero
por la triumfonta nia celo

**Boris Petrov Kavalgiev**
**(pere de L. de Otaola)**




# 38-a I.K.U.E. KONGRESO

## Luksemburgo 7-an ĝis 14-an aŭgusto 1979

En la ĉefurbo de la grandduklando Luksemburgo okazos la 38-a Kongreso de I.K.U.E. Kongresejo, situata meze de la centro de la urbo, estas la «cercle» konstruita en 1907 kaj ornamita per friso de P. Blanc kaj P. Federspiel, kiu montras la transdonon de la liberecdokumento fare de la Dukino Ermesinde en la jaro 1244. Ĝi estas proksima de ĉiuj vidindaĵoj kaj vide al vide troviĝas la ĉarma piedira zono kun multe da gastejoj kaj kafejoj.

La Alta Protektanto de la Kongreso estas la episkopo de Luksemburgo. Aliaj eminentuloj estas en la Honora Komitato, i.a. la honora Ŝtatministro, la Abato de Clerbaux, kaj aliaj. La prezoj de la hoteloj varias de 400 B.F. ĝis 1.000 B.F. kaj inkluzivas, memkompreneble, matenmanĝon kaj duŝon aŭ banejon.

Temo de la Kongreso estas «La Rajto je Vivo» kaj gravaj prelegoj kaj diskutoj pri tiu interesa kaj aktuala temo estas antaŭviditaj. Kompreneble, ĉiutage okazos solena diservo en la internacia lingvo, artaj kaj distraj vesperoj, filmoj, ekskursoj k.t.p.

La Esperanto Centro Luksemburgo eldonis afiŝojn, glumarkojn k.t.p. okaze de la Kongreso.

Estu bonvenaj en la verda koro de Eŭropo.

Petu aliĝilojn kaj pli detalajn informojn de:

Esperanto-Centro Luksemburgo, Poŝtfako 828.— L-Luxemburgo.

## IOM PRI LUKSEMBURGO, LA URBO DE LA IKUE - KONGRESO 1979 (trad. R. Haupenthal)

Elira punkto de la nuna Luksemburgo estis en la jaro 963 la starigo de « eta burgo » = Lucilinburhuc, kiu estis la nukleo de la posta urbo kaj dum la jarcentoj pli kaj pli ampleksiĝis kiel fortreso. Dum la postaj jaroj la lando akiris relative grandajn teritoriojn, kiujn dum la sekvaj jarcentoj okupis diversaj dinastioj: germanoj, habsburganoj, hispanoj, francoj, aŭstroj. Fariĝinte grandduka lando en 1815, Luksemburgo dum kelka tempo apartenis parte al Prusio, parte al Nederlando; poste ĝi estis vendota al Francio, sed en 1867 ĝi akiris neŭtralecon. Nur en ĉi tiu jarcento la germana nomo Lützelburg cedas al la nuna, francigita formo. Nuntempe, la grandduka lando estas hereda monarkio. Luksemburgo aparte famiĝis per tio, ke la komuna eŭropa merkato por karbo kaj ŝtalo en 1951 eklaboris tie, kaj tiel fariĝis la unuaj paŝoj por la eŭropa unuiĝo. La tiama franca ministro por eksterlandaj aferoj, Robert Schumann, la « patro de Eŭropo », naskiĝis en Luksemburgo.

Laŭpejzaĝe, Luksemburgo dividiĝas en tri grandajn teritoriojn. En la nordo troviĝas la t. n. Oesling, parto de Ardenoj, alta je 400-500 m, profunde entranĉita de riveraj valoj. Tie situas unu el la plej belaj kaj romantikaj lokoj, Vianden. La meza parto, Gutlando, estas ondoza, fekunda lando ekspluatata kiel paŝto-tereno. Tie situas la ĉefurbo Luksemburgo. Poste, en la sudo, estas la parto plej malgranda, sed ekonomie plej grava, la industria teritorio. Signifa ĝi estas pro la abundaj fer-ercaj provizoj. La urbo Esch-sur-Alzette estas konata ĉefe pro siaj uzinoj de fero kaj ŝtalo. Fine, por la vin-amatoroj, ni ne forgesu la teritorion laŭlonge de Mozelo formanta la landlimon al Germanio.

Luksemburgon oni nomas urbo miljara. Fama rekonilo de ĝia armiteco estas la fortreso. Kvankam multe detruita, ĝi tamen postlasis imponajn restaĵojn; ekz. restojn de la eta burgo; la Citadelon de la Sankta Spirito, potencajn fortikaĵojn; sur rempara promenejo oni povas admiri diversajn belajn turojn. Grandan admiron trovas longa reto da subteraj tuneloj.

Luksemburgo kromnomiĝas urbo de la pontoj. Nombreblas 91 pontoj, parte tre potencaj laŭ la alto kaj la vasto. Ili necesas por ligi la diversajn altaĵojn sur kiuj konstruiĝis la supra urbo kaj por transponti la valojn de tiu suba. La fortreso kaj la pontoj dum la turisma sezono estas grandioze lumigataj. Aliaj vidindaĵoj estas: la grandduka palaco (16a kaj 18a jarcentoj, rimarkinda renesanca parto); la katedralo de Nia Sinjorino (episkopa preĝejo, pompaj barokaj skulptaĵoj; nova kripto); la iama jezuita kolegio (1603, 1686, 1713, 1735); la urba domo (1830 - 1838); la Kapelo de Sankta Kvirino (14a jc.); Sankta Johano (17a jc.). Rimarkindaj modernaj konstruaĵoj estas: la urbodomo « Cercle » sur la parada placo, la « bona ĉambro » de la luksemburganoj, kie, liberaere sub arboj kaj ĉe koncerto, oni trinkas aperitivon en pariza atmosfero; la episkopa palaco; la nova urba teatro; la monumento al Robert Schumann; la nova junulargastejo; la Eŭropa Centro Kirchberg.

# RECENZOJ - RECENZOJ - RECENZOJ

**A PRACTICAL COURSE IN ESPERANTO.**—Dr. Ferenc Szilágyi, adaptis por anglaj parolantaj Landoj Fred Wadham. 12ª Eldono. Eldonejo: The Esperanto Publishing Company (Aŭstralio).

Kiam lernolibro tiel interesa kaj praktika kiel estas «A PRACTICAL COURSE IN ESPERANTO» aperas en sia 12an eldono, oni povas konstati ke ĝi estas grandskale uzataj por lernantoj de la internacia lingvo.

La aŭtoro, la mondkonata esperantisto D-ro Szilágyi, verkis amuzan kaj interesan lernolibron, kie la praktika parto havas specialan rolon, dank'al la pluraj demandoj kiuj sub la multnombraj kaj diversaj desegnoj preskaŭ plenigas la libron. En tiu aspekto la libro estas ege rekomendinda por ĉiuj kiuj deziras lerni ESPERANTON praktike.

La libro konstas el 16 lecionoj kaj je la fino de ĉiuj el ili, estas gramatikaj klarigoj, angleskribitaj, kies aŭtoro estas S-ro Fred Wadham.

Je la fino de la libro aperas publikigataj diversajn prozajn kaj poeziajn tekstojn, Tabelon pri Prefiksoj kaj Sufiksoj kun anglalingva klarigo, Vortareton Esperante-angle kaj la solvon de la ekzercoj kiuj angle estas en la diversaj lecionoj.

La amuzaj aventuroj de S-ro Adamson, kiu aperas laŭlonge de la teksto, estas altiro por ke la lernanto studu Esperanton kun gaja mieno. Resume, rekomendinda libro por ĉiuj anglaparolantoj kaj por ĉiuj kiuj konas la anglan lingvon.

**L. Hernández**

**ANTOLOGIO DE ARGENTINAJ NOVELOJ.**—Dek aŭtoroj, 18 noveloj. Tradukis Bastono de Kordobo, Ergoto de Bonaero kaj Alfredo Lara. 21 ilustraĵoj de Horaco de Diamanto. Antaŭparolo de Ergoto de Bonaero. Diamanto (Entrerio).—Argentina Esperanto Muzik-Eldonejo, 1978.—200 paĝoj. Broŝurita.—16c-mj.—465 p-tojn.

Kun la titolo per kiu mi komencis ĉi tiun skribaĵon, aperis je la fino de la pasinta jaron nova esperanta libro, en versio el la kastilija lingvo, kiun mi legis kaj relegis avide. Ĝi konsistas el la jenaj partoj: a) antaŭparolo; b) biografiaj notoj; c) noveloj kun belaj ilustraĵoj.

La titoloj de la verketoj estas la jenaj: «La Falo», «La Taŭro», «La Psikoanalizo», «La Industriistoj de la Merĉo», de Ayala de Gaŭna; «La Sinekuro de l'Sinjoro Kristino» de Brooz; «Grafo Liberato», «La Cenjarulo» de Nole; «Kriola Hidalgo», de Alvarez; «La Himno», «La Poeto», de Gerchunoff; «Ĉi vespere Antaŭkristnasko» de Guiraldes; «La Amatorkuracisto», «La Prezo de Piedlazo», de Leguizamón; «La Ruana Ĉevalido», de Linch; «Olivera, la brazila Dungito», «Morta Viro», de Quiroga; «La Blanka Koko», «La Nigra Kapeto» de Rozemmacher.

Ĉu mian impreson post la agrabla legado de tiu alloga bukedo literatura? Kun vera plezuro.

La antaŭparolo respegulas per flamstilo la belan enhavon de la libro, kaj samtempe incitas legi la interesajn verketojn trafe kompilitaj de Bastono de Kordobo.

La biografiaj notoj informas, mallonge sed ĝuste kaj precize, pri la aŭtoroj kaj iliaj verkoj.

Pri la Antologio, oni povas diri sen erari ke ĝi kontribuas al la konado de la diversaj aspektoj kaj nuancoj de la argentina vivo. La kreinta povo de la verkistoj pri iliaj belaj rakontoj, ofte plenaj de bona humoro, gvidas la gelegantoj mirinde tra ampleksaj argentinaj komarkoj por montri al ili la diversajn homojn, la etoson, la kutimojn, la bestojn, la plantojn kaj ĝis la historion de la lando de Martín Fero.

La tradukoj, kiel faritaj de veraj magistroj, tre bonaj. Ili enhavas kelkajn neologismojn, precipe toponimoj, sed ili estas konvene klarigitaj.

La prezentado ankaŭ estas bona; bona papero, klaraj literoj kaj konsekvence bona preso.

Finfine mi opinias ke la «Antologio de Argentinaj Noveloj» ne povas manki en nenia esperanta biblioteko, precipe de tiu de la geesperantistoj kiuj parolas la kastiljan lingvon. Mi rekomendas aĉeti ĝin, certe ke ĝia legado ne defraŭdos. Tiel, plie, oni stimulos la eldonintojn por daŭrigi la belan komencitan taskon.

INSTRUISTO.

# I.F.E.F. KONGRESO EN TURKU (FINLANDO)

De la 15-an ĝis la 21-an de junio, okazos en la supre menciita urbo la 31-a Kongreso de I.F.E.F. (Internacia Fervojista Esperanto Asocio).

La kongresurbo kiu ĉijare festas sian 750 jaran ekziston kiel urbo, havas 165.000 enloĝantojn, kies duono laboras en varispecaj industrioj. Ĉirkaŭ 1.280 konstruiĝis ĉe la elfluejo la kastelo de Turku. Post variaj episodoj la kastelo nuntempe servas kiel Muzeo kaj ejo por festaj okazaĵoj. La lerneja kaj universitata influo multe stimulis la evoluon de la urbo. En 1640 estis kreata la unua Universitato. Nuntempe la urbo posedas kvar artlernejojn. Sekve de sia historia signifo kaj de sia geografia situo, Turku estas ankaŭ grava centro de turismo.

La 31-an I.F.E.F. Kongreson okazigos en la kongresa centro «Ikituuri».

La kongresa programo, ja interesa, konsistos i.a. el faka prelego, popoldanco, prelego pri finno-ugraj popoloj, arta vespero kun teatraĵo prezentota de la Esperanto-teatro de Finlando, ekskursoj k.t.p.

# NOVEDADES DE LIBROSERVO

| | |
|---|---|
| La Senmorta kaj la senviva (D-ro N. Isaac) | 190 p-toj. |
| Kaŭkazaj Rakontoj (M. J. Lermontov) trad. S. Staritsky | 190 p-toj. |
| La Homo sur sia Vojo (M. Fernández Menéndez) | 515 p-toj. |
| Taglibro de Kongresano (V. Setala) | 55 p-toj. |
| Paŝoj al Plena Posedo (W. Auld) | 425 p-toj. |
| Karlo (E. Privat) | 78 p-toj. |

Ankaŭ Libroservo de H.E.F. havas je dispono de ĉiuj esperantistoj filatelistoj:

Koverton kun speciala stampilo de la I.K.U.E. Kongreso en Romo po 40 p-toj kaj kartojn kun speciala stampilo de la I.K.U.E. Kongreso en Censtohovo (Pollando) po 30 p-toj.

# ESPERANTO-POŜTMARKO

La svisa PTT eldonas, okaze de la 64a Universala Kongreso de Esperanto en Lucerno, Esperanto-poŝtmarkon en valoro de sFr. 0,70. La marko portas grafikan motivon de la svisa kaj unua varmaera Esperanto-balono kun la surpreso de la kompleta kongresa nomo. La valoro de 70 centimoj estas la afranka tarifo por poŝtkarto sendita al eksterlando.

Eldontago estos la 21a de februaro 1979. PTT samtempe eldonas oficialan unuatagan koverton (FDC) kun speciala unuataga stampo.



